

60-taga resumo de ILEI

Kion oni povas fari en 60 tagoj? Nu, iri trikvaronvoje ĉirkaŭ la mondo kun Paspartout, travivi en arkeo 1,5 inundojn, spekti 1728 epizodojn de la sapopero 'Dallas', kuiri 28.800 manĝindajn ovojn (aŭ 57.600 nemanĝindajn). Pli produktiva solvo estas sekvi la progreson de ILEI tra tiom da tagoj de post la enpostenigo de nova estraro en la krakova konferenco. Jen kelkaj atingoj:

- Lanĉo de lastmomentaj stipendioj por sekurigi la okazigon de instruisto-trejna kurso.
- Sukcesa realigo de tiu kurso en Poznan, Pollando de septembro 12 ĝis 17.
- La *Manlibro pri Instruado de Esperanto* estas reeldonita, distribuita kaj vendata. (vidu sube)
- Dupaĝa raporto kun fotoj aperas en la oktobra *Esperanto* pri nia ĵusa konferenco.
- Vizito de la nova kasisto al la antaŭa nun okazas, por certigi ordan transdonon.
- Ĉiuj esencaj financaj dokumentoj pri 2008 estas elŝuteblaj el nia retpaĝo.
- Buĝetoj 2009 kaj 2010 (indika) estas tie konsulteblaj.
- Raportoj de 19 sekcioj el 2008 estas kompilitaj en publike alirebla formo.
- Nia ĉina sekcio reaktiviĝis kaj aktive raportadas siajn agadojn en la sekcia listo.
- La ligo ricevis kaj traktos aliĝpeton por hispana sekcio. (atendas novan komitatatan diskutliston)
- Salutleteroj de ILEI iris al nova lernejo inaŭgurita en Kinŝaso kun esperantista apogo.
- Du informiloj estas eldonitaj pri la kuba konferenco, je aŭg 18 kaj sept 22.
- Finaj konsultiĝoj okazas por aperigi la konferencan aliĝilon.
- Ekzamena sesio estas pretigata en Togolando por decembro 2009.
- Regularo por ekzamenoj por blinduloj estis akceptitaj de la komitatoj de ILEI kaj UEA.
- Diskutoj inter ILEI kaj edukado.net celas pretigi ret-kurson pri instruista trejnado.
- La tria numero de IPR aperis, kaj estas disponigata al la retaj membroj.
- Materialo el la konferencaj simpozioj tra la lastaj kvar jaroj estas arigitaj por aperigo.
- La estraro decidis, ke la novaj kostoj de retmembrecio aplikiĝos ekde jan 1, 2010.

Ni raportis post 30 tagoj kaj denove post 60. La ĝojo estos universala reage al la novaĵo ke ILEI ne intencas raporti sian progreson okaze de la paso de 90 tagoj de post la krakovaj elektoj. Ĝuu dek tagojn da paco. Ni raportos okaze de la 100-taga limo.

Dissendita: Okt 22, 2010. Postnotoj verde.

SMG D:...ILEI/Planado

